n-ro 60

aprilo 1998

**IKEF en Interreto**

Informoj pri IKEF nun estas ankaŭ en lingvoj angla, franca kaj germana en la hejmpaĝo (adreso je p. 2).

Je redaktofino estis ricevita informo de la prizorganto de la IKEF-paĝoj, Bent Holm, ke li estas preparanta strukturon, tra kiu ĉiu IKEF-membro povas mem aperigi siajn personajn informojn sur la IKEF-paĝoj. La instrukcioj por fari tion troviĝas je p. 10. Provu ! Komentoj kaj konsiloj estas bonvenaj je <service(a)teamholm.dk>.

**Donacoj**

La kasisto dankas pro jenaj donacoj ricevitaj dum la pasinta jaro:

Basso (120 BEF), Bühl (20 DEM), Dengler (20 DEM), Houssou/Kohrs (210 BEF), Lee (1260 BEF), Yamasaki (1140 BEF).

**Enhavo**

Administrado - Grava atentigo al la membroj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
Raporto pri agado de IKEF dum 1997 . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 4
Financa raporto . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 6-7-9
Komercaj petoj kaj proponoj - novaj membroj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 11

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: "Laŭokaza Novaĵletero") estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König.

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**:

Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)agoranet.be.

<u>Atentu !</u>

Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur <u>send</u>adreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

---

IKEF-informoj en Interreto: http://www2.dk-online.dk/users/teamholm/ikef.htm

---

**La jara membreca kotizo** estas 600 belgaj frankoj (BEF) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") (aŭ egalvaloro: 30 NLG, 30 DEM, 20 USD) kaj 400 BEF por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj") (20 NLG, 20 DEM aŭ 14 USD). Kiu aliĝas meze de la jaro, pagu por 18 monatoj (900 aŭ 600 BEF).

Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj**: - Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per **eŭroĉeko** (en belgaj frankoj, kun kartonumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT, kaj per internaciaj respondkuponoj (1 IRK = 34 belgaj frankoj). La IRK estu stampitaj de la eldonanta poŝtoficejo.

**Perantoj**:

*Ĉeĥio*: S-ro **Vladislav HASALA**, A. Dvořaka 1, CZ-696 62 STRAŽNICE

*Cinio*: S-ro **WANG Tianyi**, Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, rete komerco(a)public.xa.sn.cn



*Francio*: S-ro François-Xavier **GILBERT**, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy)

*Germanio*: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

*Hungario*: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio*: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

*Japanio*: S-ro **YAMASAKI** Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12; retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

**Administrado - Grava atentigo al niaj membroj:**

1. La estraro prezentas sur la sekvaj paĝoj sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 1997 kaj proponas aprobon de tiu raporto.

2. La estraro prezentas sur la paĝoj 6-7-9 la financan raporton de IKEF por la jaro 1997, notante ke la ciferoj estas prezentitaj en bona tempo al la revizoro. D-ro Polerani juĝis ilin bonaj kaj en ordo. Tial la estraro proponas aprobon de tiu financa raporto.

3. La estraro notas la sumon de financa profito de 20.539 BEF kaj proponas aldonon de tiu profito al la kapitalo.

4. La estraranoj s-ro BRAUN kaj d-ro PICASSO, ambaŭ elektitaj en 1996, baldaŭ estos du jarojn en sia ofico. Laŭ la statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Do ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. S-ro BRAUN pretas denove kandidatiĝi; male d-ro PICASSO intencas ĉesi sian oficon. En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj.
   La estrarano s-ro Daniel KÖNIG, en julio 1997 ree elektita por du jaroj, petis, ke li rajtas antaŭtempe demisii de ĉi tiu posteno. Kaŭzo por tio estas nova, grava profesia tasko, kiu lasas al li neniun liberan tempon por la agado de estrarano. La ceteraj estraranoj akceptas tiun peton kaj dankas s-ron KÖNIG pro lia laboro farita dum lia estrara periodo.
   Do - por la eksiĝontaj estraranoj s-ro KÖNIG kaj d-ro PICASSO ni devas elekti posteulojn, t.e. ni serĉas kandidatojn por tio. Membroj de IKEF kiuj pretas kandidatiĝi, estas petataj, ke ili anoncu sin ĝis 1998-05-30 al estrarano s-ro François-Xavier GILBERT, 33 rue Louvière, F-55190 Void-Vacon. Koncerne la elekton vidu ciferon 5 sube.

5. Nia statuto, alineoj 7.4. kaj 8, montras la procedon pri aprobo de la financa raporto kaj de la raporto pri agado. Ĉi-jare ni denove organizos Ĝeneralan Kunvenon por niaj membroj kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Montpeliero, Francio. Diskutado kaj aprobo de la raportoj (vidu punktojn 1-3 supre) kaj elekto de estraranoj (vidu



punkton 4 supre) okazos tie. Membroj kiuj ne povas veni al Montpeliero, rajtas skribe komisii alian membron ĉeestontan pri aprobo kaj voĉdonado; tian agon la estraro rekomendas. La precizan daton, horon kaj salonon de nia Ĝenerala Kunveno ni avizos en la venonta La Merkato.

La Estraro de IKEF

**Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1997**

Membraro denove kreskis

La membraro denove kreskis, nome de 126 fine de 1996 al 136 fine de 1997, do je 10 personoj. Inter ili troviĝas tri dumvivaj membroj.

La nombro de perantoj ciferas fine de 1997 ses. Komence de 1998 peranto por Ĉeĥio estis nomumita: s-ro Vladislav HASALA (IKEF 227). Ĉar pligrandiĝanta asocio bezonas pli da perantoj - almenaŭ en landoj kun granda membronombro - ni klopodas instali pliajn.

La Merkato regule aperis

Dum 1997 nia komunikilo La Merkato regule kaj tre akurate aperis kvarfoje.

Terminara Sekcio bezonas novan puŝon

Nia kunordiganto s-ro YAMASAKI Seikô (IKEF 43) bezonas novajn helpantojn por sia laboro. Ne eblas krei terminojn sen sufiĉe da internacia helpado.

Aktuale la Sekcio okupiĝas pri tradukado de la terminaro "Terminologie Economique" (Ekonomia terminaro) de la Eŭropa Parlamento. Ĝi enhavas entute ĉ. 2000 terminojn - de "accord d'autolimitation" (interkonsento pri memlimigo) ĝis "zones industrielles" (industriaj areoj) - uzatajn en la ekonomia sfero de tiu parlamento, en la 11 lingvoj de la Eŭropa Komunumo. Ni celas aldoni Esperanton kiel plian lingvon. La laboroj troviĝas ankoraŭ en komenca stato.

Kongresaj aranĝoj

Dum la Universala Kongreso en Adelajdo okazis informkunveno kun entute 17 membroj kaj interesitoj de IKEF. La kunvenon prezidis s-ro YAMASAKI, kiu klarigis la celojn kaj agadon de IKEF kaj ankaŭ gvidis la viglan diskutadon.

Ankaŭ dum la Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso okazinta dum la



pentekostaj tagoj en Stuttgart, Germanio, IKEF okazigis informkunvenon, gvidatan de s-ro Braun, al kio ĉeestis entute 11 personoj. Krom tio, en la kongreso de Stuttgart, kies ĉefa temo estis "Eŭropo - kien vi?", pluraj IKEF-membroj partoprenis en diversaj programpunktoj. Prelegis pri eŭropaj temoj respektive partoprenis en la podia diskuto kun parlamentanoj d-roj Werner BORMANN (IKEF 27), Michael CWIK (IKEF 50) kaj Rainer KURZ (IKEF 235).

Verka agado sur rimarkinda nivelo

La verka agado estis je la sama nivelo kiel en la antaŭa jaro. Tio montriĝis ĉefe en MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo, kie du IKEF-membroj funkcias kiel responsaj redaktoroj pri iu fako: Roland ROTSAERT (IKEF 3) pri ekonomio kaj YAMASAKI Seikô pri lingvoj. Krom ili, jenaj aliaj IKEF-membroj kontribuis dum 1997 al MONATO per verkado de artikoloj: s-ro Marc VANDEN BEMPT (IKEF 251), s-ro Kep. ENDERBY (IKEF 233), s-ro Koffi GBEGLO (IKEF 41), s-ro Per HAGEMANN (IKEF 5), s-ro Gilbert LEDON (IKEF 177), s-ro MU Binghua (IKEF 213), s-ro Jan PACHTER (IKEF 34), s-ro Harald SCHICKE (IKEF 185), s-ino Flory WITDOECKT (IKEF 78), s-ro Zandandu Ntomono ZOLA (IKEF 181). Do la rubriko "ekonomio" en ĉiuj 12 numeroj de la jaroj 1997 estis kontentige plenumita. Ĉe tiu okazo ni denove atentigas niajn membrojn pri la fakto, ke MONATO rolas kiel la ĉefa podio por nia verka agado, kaj ni rekomendas al ili la abonon de MONATO.

Plie F.-X. GILBERT (IKEF 14) faris en la revuo La Domo de TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) serion de raportoj pri la Komercaj Ĉambroj en Francio.

Praktikaj agadoj

En MONATO aperis reklamanonco de japana firmao MITSUI. Ni opinias la peradon de tiaj entreprenaj anoncoj al MONATO kaj aliaj esperantlingvaj magazinoj unu el la plej efikaj agadoj.

BEK (Bulteno de Esperanto-Komerco, dulingva esperante kaj ĉine) de nia ĉina peranto WANG Tianyi (IKEF 117) - pli precize revueto pri anoncoj kaj deziroj al vendo/aĉeto de varoj aŭ diversaj servoj - daŭrigis sian aperadon per ses numeroj en 1997. La eldonkvanto estas pli ol 600, el tio ĉiu IKEF-membro

ricevas ekzempleron. Ĉe tiu okazo menciindas, ke s-ro WANG Tianyi estas supozeble la sola IKEF-membro, kiu gajnas sian vivtenadon senescepte per Esperanto-agado kaj -komercado. Nia ĉeĥa membro d-ro Petr CHRDLE (IKEF 171) per sia entrepeno KAVA-PECH almenaŭ parte pangajnas sian vivon pere de Esperanto. Gratulon al ambaŭ sinjoroj.

En ĉiu La Merkato aperas komercaj petoj kaj proponoj de esperantistaj komercistoj. Ni aperigas ilin senpage por homoj el landoj kun pagoproblemoj. Bedaŭrinde ni ne ricevas informon pri la sukceso de tiaj anoncoj.

Nia membro s-ro Kees RUIG (IKEF 68) lanĉis novan projekton, aperigitan en La Merkato n-ro 58. Temas pri profesi-komercista reto, en kiu esperantistoj helpu kiel peranto en mondvasta komercado. S-ro RUIG komence de 1998 diskonigos la rezulton de sia enketo.

Ĉe tio ni volas mencii ITRE (Internacia Tradukreto pere de Esperanto) de nia membro Daniel DURAND (IKEF 187). Ĝi havas la celon de tradukado de dokumentoj el ĉiuj kampoj en kiujn ajn lingvojn, ankaŭ por komercistoj/ekonomiistoj. Ĝi bone marŝas sed ĝiaj kapacitoj kun entute 66 tradukantoj permesas ankoraŭ pli da mendoj/komisioj.

ERA, Esperanto Radikala Asocio, aperigis sub redaktado de la nobelpremiita profesoro Reinhard SELTEN 160 paĝan libron "La kostoj de la eŭropa lingva (ne-) komunikado". En ĝi kunlaboris niaj membroj d-ro Werner BORMANN, prof. B.A. WICKSTRÖM (IKEF 40) kaj s-ro Grégoire MAERTENS (IKEF 29).

Interreto/Internet-aliĝo de IKEF-anoj kreskas

Pli kaj pli de niaj membroj aliĝis al Interreto. Ĝi estas bonega rimedo por la interŝanĝo de informoj inter la membroj.

Resumo

La jaro 1997 havis por IKEF du flankojn, pozitivan kaj negativan. Ĝi alportis grandan intereson el la esperantistaro, kion pruvas la plialtiĝinta nombro de membroj. Tio garantias solidan financan bazon (vidu la financan raporton).

Aliflanke la entutaj aktivecoj de niaj membroj falis, kompare al la antaŭa jaro. La celon de nia fakgrupo ja ne estas akumuli monon, sed elspezi ĝin por celtrafaj agadoj farotaj laŭ la ideoj de niaj membroj.

Ni denove ripetas, ke la taskaro sur la kampoj komerco/ekonomio/ekonomiko estas giganta kaj fruktopromesa por ni, kaj ke ni sendube havos progreson, se ni intensigos nian aktivecon. Al tio ni invitas niajn membrojn. Dum la jaro 1998 ni volas koncentri niajn fortojn al la "Kampanjo 2000", strategio de UEA por nova internacia lingva ordo, kaj ĉe tio ni petas la kunlaboron de ĉiu opa de vi. Ni esperas ke ĉi-foje la pligrandiĝinta membronombro estos rezultiginta rimarkeblan progreson ĝis fino de la nuna jaro.

Por la Estraro
Franz Josef BRAUN, Prezidanto



**Universala kongreso**

Laŭ provizora programo, la ĝenerala kunveno de IKEF okazos je merkredo de la kongresa semajno. La tradician viziton al komerca entrepreno oni planas je jaŭdo aŭ vendredo.

**Financa raporto por la jaro 1997** (ciferoj estas je p. 6-7)

Eksterordinare granda profito

La spezokonto montras grandan profiton, tamen ne pro aktiva agado, sed pro manko de agado. Dum 1997 estis neniu speciala agado, do la ciferoj de la tiurilataj kontoj (ĝeneralaj kostoj, specialaj agadoj, donacoj) estas malaltaj. Ankaŭ la kostoj de korespondado pro tio estas malpli altaj.

Libroteni en eŭroj ekde 1999 ?

Por financaj transakcioj la eŭro estos uzebla ekde 1 januaro 1999. Pluraj kompanioj jam anoncis ke ili librotenos en eŭroj. Eble ankaŭ IKEF faru tion. Ĉu ni jam en 1999 anstataŭigu niajn kotizojn en eŭropaj valutoj per eŭro-kotizoj? Unu eŭro egalas al proksimume 40 belgaj frankoj aŭ 2 germanaj markoj; jara kotizo laŭ nuna tarifo estus 15 aŭ 10 eŭroj, depende de la landokategorio.

Roland ROTSAERT, financa konsilanto

**Anoncitaj aranĝoj**

**Vieno, Aŭstrio**, 24-26 aŭgusto 1998: "Profesia komunikado, terminologio kaj planlingvoj", "Terminologia laboro kaj scio-transigo": eŭropaj legantoj trovos anoncon aliloke en ĉi tiu numero.

**Rijeka, Kroatio**, 10-16 majo kaj 13-20 septembro 1998: Esperanto-Komerca Agado: kurso, elmontrado de varoj, prelegoj. Aliĝkotizo: 60.000 ITL; kurskotizo: 150.000 ITL (kursanoj ne pagas aliĝkotizon); plena pensiono (tage): 30.000 ITL en plurlitaj ĉambroj, 60.000 ITL en dulita hotelĉambro kun banejo. Informoj: Orbis Pictus, S-ino Visnja Brankovic, Via Laghissa 6, I-34131 TRIESTE, Italio, tel./fakso +39-40-767875 aŭ S-ro Vjekoslav MORANKIĆ, Esperanto Societo Rijeka (IKEF 217), Lipa 40/E, HR-51000 RIJEKA, Kroatio, tel. +385-51-518601. Proponoj de instruistoj bonvenas.

**Radio Aŭstrio**



Jen nova horaro valida ekde 29 marto 1998: Dimanĉe je 04.05 kaj 14.05 UTC (6155 kHz-49 m, 13730 kHz-22 m) kaj je 23.05 UTC (9870 kHz-31 m). En Eŭropo ankaŭ aŭskulteblas tra Astra Digital Radio (Astra 1C, kanalo 45, 11.141,25 MHz/8,10 MHz). TTT-adreso: http://www.orf.at/roi/ ;
rete: <katalin.tosegi(a)orf.at>; poŝta adreso: Radio Österreich International, Esperanto Redakcio, AT-1136 VIENO

**Provizora klarigo pri redaktado de persona IKEF-retpaĝo:**

1) Iru al: http://www.freeyellow.com/
2) Kliku al: Members Main Menu
3) Skribu nomon: <membronomon au membronumeron>
4) Skribu sekretan pasvorton: <personan pasvorton>
5) Premu je: Website Manager
6) Vi vidos vian index.html, premu edit kaj poste GO
7) Nun vi povas punkton post punkto redakti vian paĝon au krei novan!
8) Ĉiam finu per premado sur: BUILD

Vi ricevos konfirmon retpoŝte de FreeYellow.

Kompreneble tio postulas, ke vi havas (eventuale tra alia persono) aliron al Interreto. Mi pretas tion fari tre malmultekoste. Pli detalaj informoj (en angla lingvo) legeblas je http://www.freeyellow.com/members2/teamholm/.

Bent Holm <service(a)teamholm.dk>, fakso (+45) 8615 3451

**Pola Stelo: brajla gazeto iĝos songazeto**

Tre verŝajne ankoraŭ nunjare aperos nova esperanta songazeto, kiu konservos titolon de la brajla gazeto Nova Stelo. Estas bezonataj minimume 150 abonanotoj. Ĝi kostos proksimume 28 USD (+ sendkostoj) kaj aperos kvarfoje jare (po 2 kasedoj 90-minutaj). Enestos polaj (precipe kulturaj) novaĵoj, E-movadaj kaj blindulaj aferoj kaj eroj el elsendoj de Pola Radio. Por

provizoraj mendoj: Pola Radio, E-Redakcio, PL-00-977 VARSOVIO, fakso 48-22-645-5917, reto <pettyn(a)radio.com.pl>.

**Esperanta Jura Asocio**

Daŭre restas stoko de malnovaj ekzempleroj de Internacia Jura Revuo (LM57, p. 3), haveblaj kontraŭ pago de sendokostoj ĉe Norvega Esperantista Ligo (telefono kaj fakso +47-22-35 08 94, reto <esp.oslo(a)sn.no>. Samloke ankaŭ haveblas 'Asiriaj Leĝoj' (63 p., 30 norvegaj kronoj).

Jara membrokotizo de Esperanta Jura Asocio estas 30 aŭ 15 NLG (laŭ landokategorio). UEA-konto: ejax-r. Sekretario: André Ruysschaert, 4 rue Théodore Eberhard, L-1452 LUXEMBOURG.

**Komercaj petoj kaj proponoj**

**Bosnio - Eŭropa Unio**

Branko Miljko kaj Mustafa Tandir bredas japanajn koturnojn (Coturnix Coturnix variatio Japonica) por produkti ties ovojn kaj viandon, pruvitajn kuracilojn kontraŭ iuj malsanoj. Cele al eksporto al EU, ili deziras eltrovi:
- kiom kostas koturnaj ovoj (pece) kaj viando (kilograme);
- ĉu en EU estas negocantoj de tiaj varoj.
Adreso: ul. porodice Ribar 65, 71000 SARAJEVO, tel. (387-71)64.84.52, fakso 654978.

**Ĉinio**

Kulturaj interŝanĝoj, turismaj servoj, jura konsilado por investoj, eksporto de artaĵoj, teksaĵoj, ludiloj, bambuaĵoj. S-ro Ling bo, Paco Kompanio por Konsultiĝo kaj Internaciaj Aferoj, P.O. Box 2, CN-230001 HEFEI; telefono/fakso 86-551-2632545, -4484606, rete <cnhflib(a)public.hf.ah.cn>.

**Irano**

S-ro Alireza Tehrani, dogan-peranto, No. 39, Agagia 1 street, Sajadshahr, Mashrad 91876, tel. (009851) 786158, preparas kaj eksportas manĝaĵojn kaj meblaron (precipe al centra Azio). Li



ankaŭ kapablas liveri aktualajn informojn pri irana komerco kaj dogano.

**Kongo (Kinshasa)**

Apotekistoj, membroj de Konga Esperanto Rondo, deziras aĉeti medikamentojn. Listo 3-paĝa haveblas ĉe Roland Rotsaert. Sendu prezofertojn (CIF Kinshasa) al: Konga Esperanto Rondo (KER), Immeuble Salemite, Av. Bongolo N° A/15, Yolo-Nord 3, B.P. 6055, Kinshasa VI.

**Nova adreso**

194. Gerhard Hirschmann, Lilienweg 8, 39167 HOHENDODELEBEN, telefono oficeje +49-391-5681765, hejme +49-172-3904925.

**Nova membro**

256. S-ro Jorg DE MULDER, Leopold II-laan 176, B-1080 BRUSSEL-KOEKELBERG, Belgio,
telefono/fakso 02-411.71.75, reto <jorgo(a)agoranet.be>

**Nova dumviva membro**

117. WANG Tianyi